

# Etnismo

ISSNO93

N-ro 94

INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

31.12.2014



## ORIENTA TAGLIBRO


Scienca vojaĝo al Saĥaleno  
por renkonti nivĥojn kaj  
ujltojn.

## KREOLA POEMO

### Por kunfesti la sendependiĝon de Maŭricio <sup>(1)</sup>

**E**n la Hinda Oceano troviĝas landeto, kiu estas tutmonde konata ĉefe pro sia famo kiel feria vojaĝcelo. Fakte, la insulo Maŭricio estas unu el la perloj de tiu regiono, riĉa je belaj tropikaj pejzaĝoj, montoj, akvofaloj, lagetoj. Per parfumo de vanilo, vidaĵo de graciaj palmoj inter blujaj ĉielo kaj maro, sed ankaŭ per multo alia la naturelementoj abunde karesas la sensojn de vizitanto.

En 1968 Maŭricio sendependiĝis, kaj ĝia loĝantaro hodiaŭ estas komunumo ekzempla pri multkultura kaj multlingva popolo kunvivanta paco, en respekto. La ĉefaj lingvoj uzataj en la administrado kaj oficeja, profesia vivo estas la angla (oficiala) kaj la franca (la elito), sed la plej parolataj estas la kreola kaj boĝpuria (2). La gepatra lingvo de la plimulto de la maŭricianoj, sed parolata ankaŭ de alilingvanoj, estas "la maŭricia kreola" (3), kiu originas ĉefe el la franca, sed estas ties signife modifita formo, pliriĉigita da elementoj transprenitaj el aliaj lingvoj. La dua plej parolata lingvo estas "la boĝpuria" (2), kiu devenas el Barato. Krome vivas en Maŭricio konsiderinda nombro da parolantoj de aliaj lingvoj el Barato: ia. la hindia, tamila, telugua, maratia. Aliaj lingvoj, uzataj de malpli grandaj etnaj grupoj insulanaj, estas ĉefe la urdua kaj variantoj de la ĉina.



Mapo el la Poŝatlaso de la Mondo, eld. Praha 1971.

La origine neloĝata insulo, post apero kaj foriro de arabaj komercistoj, pasis el la manoj de la sekvaj aventuremuloj portugalaj sub okupadon de nederlandaj komercistoj kaj armeo. Post ties relative mallonga restado, Maŭricio estis dum du pli longaj periodoj kolonio unue de Francio, sekve kaj fine de Britio.

Rezulte de tiu historia evoluo, la nuntempa loĝantaro de Maŭricio estas plurdevena, multetna, posteuloj de la invadintoj-koloniintoj, de enmigrintoj, laboristoj venigitaj el la proksimaj Afriko, Madagaskaro, sed ankaŭ el la fora Azio (ĉefe el Barato kaj Ĉinio).

*Ledikasyon pu Travayer (LPT)* – "Edukado de Laboristoj" – estas asocio fondita en Maŭricio en 1976, kiu luktas subtene al la gepatraj lingvoj, speciale por la levo de prestiĝo de la kreola kaj boĝpuria, por multlingva edukado bazita sur la gepatra lingvo, kaj por la uzo de la maŭricia kreola (gepatra kaj ĉiutaga lingvo de pli ol 80 elcento de la maŭricia popolo) kaj de la boĝpuria (ĉ. 10 elcentoj) kiel laborlingvoj oficialaj en la parlamento. Pro sia laboro kaj atingoj *LPT* ricevis en 2013 la *Premion Linguapax*.

Responde al la unua poezia konkurso en la kreola lingvo, organizita de *LPT* en 1987, la maŭricia poeto *Alain Fanchon* verkis imaĝriĉan poemon kun la titolo *Ti bato papye* ("Paperŝipo eta"). En ĝi li priskribas per la bildo de paperŝipo flosanta riverse la senrezigne kaj nelacigeble luktantan homon, strebant al pli bona estonto, malgraŭ ĉiuj obstakloj de la vivo.

Pro sia esprimriĉeco, elokventeco, tiu poemo atestis pri la kapablo de la kreola lingvo esprimi emociojn, esti lingvo poezia – kaj do eniris la koron de la ĵurianoj.

En 2013, *LPT* starigis projekton pri eldono de libro okaze de la **46-a datreveno de la sendependiĝo de Maŭricio (2014)**, enhavanta 46 tradukversiojn de tiu poemo. Tiu ĉi projekto celas prezenti la poemon al la mondo kaj per tio havigi al la kreola lingvo prestiĝon je internacia nivelo. Malgraŭ tio, ke la maŭricia kreola estas la gepatra lingvo de la granda plimulto de la maŭricianoj, tre malmulto estas publikigita en tiu lingvo, mankas literaturaj eldonaĵoj, kreollingvaj ĵurnaloj. Ĉio okazas, publikiga en la lingvoj angla kaj franca. «Per tiu poemo ni volas promocii la kreolan lingvon al ties ĝusta loko» deklaris la prezidanto de *LPT*, aldoninte ke ja temas pri la gepatra lingvo de plimulto de la maŭricianoj, do oni ne devus heziti tion fari.

La atendoj estis larĝe superitaj, rezulte de la alvoko tradukemuloj el pli ol kvindeko da lingvoj sin anoncis por kunlaboro. La lingvistino *Tove Skutnabb-Kangas* kun sia edzo *Robert Phillipson* jam estis kunlaborintaj kun la aktivuloj de *LPT* kaj prelegis en ties scienca konferenco en 2009. *Tove Skutnabb-Kangas* verkis la finnan version de la poemo kaj proponis al la eldonistoj (*Immedia-LPT*) kontakti min por peti la kunlaboron de esperantistoj.

Nia respondo kompreneble estis tuja, pozitiva kaj entuziasma. Dek esperantistoj el Eŭropo, Azio kaj Ameriko partoprenis en la subtena agado favore al tiu projekto, tradukante la poemon en jenajn lingvojn: bulgara (*Sonia Béatrix-Koleva*), bengala (*Mina Dan*, teksta, parola), esperanto (*Stefano Keller*, teksta, parola), hispana (*Pablo León*, lingva kontrolo), indonezia (*Andre Samosir*), irlanda (*Seán Ó Riain*), islanda (*Kristján Eiríksson*), portugala (*Luís Ladeira*/teksta, *Emilio Cid*/parola), tagaloga (*Albert S. Garrido*).

La libron akompanos DVD kun gestolingvaj versioj de la poemo.

Ĉi-okaze estas menciindaj la kontribuoj al la tutmonda diskonigo de la maŭricia kulturo, per la lokaj regeomuziko kaj segao-danco, sed per esperantlingva kantado, fare de la grupo *Negro pou La Vi* (*La Persisto/Persévérance*) <http://goo.gl/ERb9N8> kaj *Mary-Jane*

*Gaspard* (Nur Amiko/*Simplement camarade*).

La 28-a de oktobro estas la Internacia Tago de la Kreola Lingvo:

“*Zurne Mondyal Langaz Kreol*”

SK

### Notoj:

(1) Tiu ĉi artikolo kaj la du versioj de la poemo samtempe aperas en *Beletra Almanako* no 21.

(2) La lingvo boĝpuria estas origine parolata interalie en boĝpuria regiono de nordorienta Barato kaj en Nepalo. Post apartigo de Pakistano kaj Barato en 1947, multaj boĝpuri-parolantoj islamaj migris al Pakistano kaj Bangladeŝo. Pli malgranda nombro da boĝpuri-parolantoj troviĝas en Maŭricio, Afriko, karibaj kaj sudamerikaj nacioj. Nur en Nepalo ĝi havas statuson.

<http://epo.wikitrans.net/Bhojpuri-lingvo?src=Bhojpuri+language>

(NdR)

(3) La maŭricia kreolo, strukturita surbaze de la franca, venas el la prakreolo de Reunio el kie frue venis loĝantoj de la insulo. Sed ĝi evoluis sub la influo de la afrikaj kaj madagaskaraj sklavojoj (multaj vortoj venas el Senegalio, el la volofa lingvo) por iĝi la kreolo de la Franca Insulo (eksnomo de Maŭricio), kiu disvastiĝas en Rodrigo-insulon kaj en Sejšelojn. Ĝi plu evoluis por iĝi la maŭricia kreolo, influita de la alvenintaj baratanoj kaj ĉinoj. (El diversaj artikoloj de Vikipedio franclingvaj). (NdR)



Vikimedia. Aŭtoro: *Damiano Luchetti*.  
Maŭricia vespero, januaro 2005.

## PAPERŜIPO ETA

Poemo de *Alain Fanchon*, Insulo Maŭricio.  
Esperanto-versio far *Stefano Keller*, Svislando.

Flosu, flosu paperŝipo eta,  
flosu, flosu miajn revojn transportanta.

Nenio rapidas pli ĉi-kanale,  
branĉetojn, pajlojn, foliojn preterpase.  
Borde de l' kanal' kure mi vin sekvas,  
spirite, kore, anime unuiĝinte kun vi komplete,  
kaj kanalakvo vian sorton, mian sorton gvidas.

Flosu, flosu paperŝipo eta,  
flosu, flosu miajn revojn transportanta.

Via flageto busbileta svingiĝas ventopuŝe,  
sur alumeto streĉite staranta fiere.  
Mia koro treme batas, ho, se vi renversiĝus!  
Kie estas ekfluo akva, kie fino ĝia,  
ĉio ĉi estas ĉu nur iluzia?

Flosu, flosu paperŝipo eta,  
flosu, flosu miajn revojn transportanta.

Pri danĝeroj grandaj vi estas nekonscia.  
Lanĉis viaspecan jam aliaj, ho, kiom da,  
kaj tiel faros post mi multaj pliaj da...  
La homoj diras, ke l' historio ripetiĝas,  
sed esper' mia, kuraĝ' via historion ŝanĝi povas.

Flosu, flosu paperŝipo eta,  
flosu, flosu miajn revojn transportanta.



Fotis *Stefano Keller*.

2014

*46 ans d'indépendance de l'île Maurice*  
46 jaroj de sendependa Maŭricio

Aliaj tradukversioj de la poemo troviĝas je: <http://www.linguistic-rights.org/kreol/>

**TI BATO PAPYE**

Kreollingva versio

*Flot flote ti bato papye  
Flot flote sarye tu mo bann rev*

*Pena pli rapid ki twa dan kanal  
Dibwa, lapay, feyaz, enn par enn to manze  
Mo galup bor kanal pu swiv twa  
Dan mo lespri, mo leker, mo lam nu form enn sel  
Dilo dan kanal gid to destine, gid mo destine*

*Flot flote ti bato papye  
Flot flote sarye tu mo bann rev*

*To ti pavyon kart bis ape balanse  
Lor enn baton zalimet fezer dan so dibute  
Mo ti leker bat tranble per to devire  
Kot dilo so kumansman, kot dilo so finisyon  
Eski tu kitsoz finalman pa enn ilizyon*

*Flot flote ti bato papye  
Flot flote sarye tu mo bann rev*

*To pa konsyan ki ena gran gran danze  
Komye avan mwa finn anvoy enn kuma twa  
Komye apre mwa pu anvoy enn kuma twa  
Dimunn pe dir ki tultan listwar repete  
Ek mo lespwar ek to kuraz nu pu fer listwar*

*Flot flote ti bato papye  
Flot flote sarye tu mo bann rev*

**Alain  
Fanchon**



Foto el artikolo aperinta en *Le Mauricien/Scope*,  
la 8-an de majo 2014.

**Alain Fanchon: ŝipestro de la "Ti bato papye/papie".**

<http://www.lemauricien.com/article/alain-fanchon-capitaine-du-ti-bato-papie>